# El la historio de Pöhlde

Pöhlde estas vilaĝo en la suda parto de Malsupra Saksio. Ĝi estas parto de la urbo Herzberg am Harz. La vilaĝo situas en la prarivera valo de la rivero Oder (Harz) proksimume 4 kilometrojn sude de Herzberg. Ĉirkaŭ 3 kilometrojn sude de Pöhlde, ĉe la periferio de la najbara vilaĝo Rhumspringe, troviĝas la Rhume-fonto, unu el la plej grandaj karst-fontoj en Eŭropo. La ejo situas iom norde de Rotenberg, de longdistanca ĉeno de altaĵoj, kiu pasas paralele de la periferio de la suda Harz-regiono. Ĝia plej alta pinto situas je 262 metroj.

Sub la konstrurestaĵoj de palatinato kaj monaĥejo oni elfosis ankaŭ trovaĵojn el la 3a kaj 4a jarcentoj. Ili indikas, ke en la loko de la korto antaŭe estis ĝermana setlejo kun la nomo „Palithi“ (=sankta rivervalo).



Pöhlde havis florepokon kiel preferata rezidejo de la Saksaj imperiestroj. Inter 922 kaj 1059 la germanaj reĝoj tre ofte, ĉefe dum Kristnaska tempo, vizitis Pöhlde. 27 vizitoj de germanaj imperiestroj kaj reĝoj estas dokumentitaj.

Inter la reĝaj palatinatoj, kiuj ekestis sub Henriko I (919-933) en la tuta Harz-regiono, specialan pozicion kiel "festotaga palatinato" havis la palatinato Pöhlde, kiu certe havis ligojn al la Benediktana monaĥejo, fondita ĉirkaŭ 950 de Mathilde, la edzino de Henriko I. La monaĥejo dum la kamparana milito 1525 estis detruita kaj dum la 30-jara milito estingita.

La nuna preĝejo de la Benediktana monaĥejo estis konstruita sur la fundamentaj muroj de la Königsburg (reĝa kastelo) kaj la pli posta Kaiserpfalz (imperiestra kastelo) de la Liudolfingeroj.

La Rhume-fonto (germane: Rhumequelle) en Pöhlde kaj proksime de Rhumspringe estas unu el la plej grandaj karstaj fontoj en Centra Eŭropo.

Sur la Thingplatz (malnovĝermana interkonsiliĝloko) troviĝas pli ol 1000-jara juĝeja tilio. En 1048 oni akuzis grafon Thietmar, la fraton de Bernardo la 2-a de Saksio pri la ordono de nesukcesa atenco al reĝo Henriko la 3-a. Post duelo, kiun oni konsideris Dia juĝo, la grafo sur tiu placo estis mortigita.



La blazono de Pöhlde montras verdan tilion sur ora fono, kreskanta sur verda grundo, kiun trafluas de maldekstre dekstren arĝenta rivero. La verda grundo indikas la enradikiĝon de la loĝantoj en la kampoj, ĉar ili preskaŭ senescepte vivas de agrokulturo.

**La birdokaptejo de reĝo Henriko**

Sude kaj supre de la vilaĝo Pöhlde sur montodorso de la Rotenberg troviĝas la kastelo-restaĵoj "Birdokaptejo de reĝo Henriko". Tra la ejo gvidas la mezepoka "Fastovojo" de la Rejno-regiono ĝis meza Germanio. Ĝian grandan aĝon montras bronzepokaj tombomontetoj proksime okcidente de la fortikaĵo. De la vilaĝo gvidas kavoformaj trairejoj al la iama kastelo. Al la loko apartenas la nomo "Birdokaptejo de reĝo Henriko". Laŭ legendo reĝo Henriko la Unua ricevis tie en la jaro 919 la informon, ke oni elektis lin reĝo.



La pli aĝa malsupra kastelo havas ovalan formon de 220 m al 122 m. Okcidente limas supra kastelo preskaŭ cirkloforma kun diametro de 97 ĝis 100 m. Evidente la fortikaĵo estis prizorgata de la vilaĝo kaj estis uzata nur dum bezono kiel rifuĝejo kaj vojobaraĵo. La fortikaĵo de la malsupra kastelo konsistas el sek-masonaĵo kun remparo ŝutita malantaŭen, en kiu estis metita bazo el fortaj kuŝantaj trunkoj. En antaŭa eskarpo estis profundigita platfunda tranĉeo. Baldaŭ poste la suda flanko ricevis fortikigan sabloŝtonan muron kun gipsomortero. La supoze origina platfunda tranĉeo estis anstataŭita per v-profila tranĉeo.

La supra kastelo estis same fortikigita per gipsomorterita muro dika de 1,8 m ĝis 2,0 m. Okcidente al la direkto Pöhlde kaj oriente al la malsupra kastelo situis du pinĉ-pordegoj. La orientan karakterizas tre longa retroiranta pordegokoridoro. Radiokarbonaj analizoj kaj trovitaj ceramikaĵoj subtenas datumon al la 9-a ĝis la frua 10-a jarcento. Strange estas ke la malkovraĵoj el palatinata kaj monakeja parto datas nur ekde la frua 10-a jarcento. Do oni rezignis pri la kastelo, kiam estiĝis la palatinataj kaj monakejaj konstruaĵoj.

**Pöhlde multe festas sian historion kaj tradiciojn. La folklora kant- kaj dancgrupo prezentas tion en popolkostumo kaj ili rakontas dum la prezentadoj pri laboro sur la kampoj kaj en minejoj.**

(Redaktis: Zsófia Kóródy)